


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

RĔDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

APUDMARA LIBERTEMPO (daŭrigo).

Frapegis ligno sur rokon. Krakis sur la rando de la rifo la levita antaŭaĵo, sed — ho, ĝojo! — pro la leviĝo la antaŭa duono skrapiris sur la rifon kaj la ondegaj pelis la boaton antaŭen.

Furioze mi signis al la aliaj ankaŭ iri antaŭen. La maŝino estis forŝirita kvazaŭ ĝi estus nur infana ludilo. Pri tio mi ege ĝojis, ĉar nun la postaĵo estis multe malpli peza. La marakvo tramal-sekigis nin, sed ni jam estis pretaj por tio. La boato ekrompiĝis sed ankoraŭ ni pretenis la flankŝnurojn de la boato. Senaverte ni estis are ŝetegitaj en la ŝaŭmon. Io bategis mian maldekstran ŝultron kaj mi sentis, ke mi estas sub la akvo. Malglataj rokroj senkompatate skrapis miajn vizaĝon kaj bruston. Blinde mi provis teni ion, sed trovis nur ŝliman fukon kaj zosteron; tien — reen — malsupren, rokpintoj — fluoj — akvoturniĝoj — tondrado, neniam ĉesontaj

Subite la akvo trankviliĝis. Spasme spiregante kaj duondroninta mi reatingis la aeron. Malforte mi eknagiis. Mi ekrigardis malantaŭen sed, konsternita, mi nerliun vidis.

„Dio mia! Ĉu estas eble, ke mi estas la sola postvivanto de nia teruriga sperto?”

Sed tuj mi ekaŭdis: „Joz-e-e-efo! Joz-e-e-e-fo! Hej! Joe! Kie vi estas? Respondu al ni! Joz-ef-o!”

Ĉirkaŭrigardante, mi subite ekvidis la tri fratojn tenantajn la maston de nia boato. Mi denove sentis min forta.

„Savita! Dankegon al la ĉiopova Dio.”

Kaj mi penegis, kiel eble plej rapide, atingi miajn kamaradojn. Tamen, kiam fine mi sukcesis tion fari, mi estis tute lacigita kaj certe perdiĝus, se la aliaj ne estus helpintaj min.

La akvo fluo rapide portis nin laŭlonge de kaj preter la insulo kaj en la malprofundan markolon, kiu estas inter la insulo kaj la firma tero. La fluo plirapidiĝis kaj estis portonta nin denove maren, ĉar ni estis tro lacaj por naĝi el la forta fluo; sed jam aŭdiĝis la batado de maŝinboato. — Dolĉa sono!

Post nelonge ni estis en varmaj, komfortaj litoj. Oni bandaĝis niajn vundojn kaj donis al ni sanigajn trinkaĵojn. Mi ekdormis

Mi nun ekridas, kiam oni memorigas al ni tiun okazaĵon, sed verdire la morto tiun tagon estis tre proksima. Ni perdis bonan boaton kaj ĝian maŝinon kaj niajn vestaĵojn kaj — preskaŭ la vivon!

Kompreneble tio finis nian marvojaĝadon por tiu somero kaj ni turnis nin al montgrimpado. Ni ankoraŭ ne spertis iun akcidenton.

Do, kiel vi supozeble jam konstatis, niaj apudmaraj libertempoj estas iom malsimilaj al tiuj, kiujn oni pasigas la tutan tagon sidaĉante en ferdekseĝo. Ho ne! Tio tute ne plaĉus al ni! Morti estus preferinde ol trapasi libertempon tiumaniere!

Seosamh O Conaire, Loughrea, Irlando.

ĈU SENDANĜERA AŬSTRALIO?

(De F. Halls, nia aŭstralia ĉefperanto).

Generale oni kredas, ke Aŭstralio estas tiel nomata „sendanĝera lando”.

Efektive, neniue el la indiĝenaj bestoj estas atakema, sed nia lando havas aliajn, pli kaŝitajn danĝerojn. Tiuj troviĝas **precipe** en la tropika nordo de la kontinento. Tuj venas en la pensojn la reptiloj tiuj timigaj, senemociaj estaĵoj.

Sendube la plej bone konata kaj fi-fama estas la krokodilo, kiu respondecas pri la morto de multaj homoj kaj ankaŭ pri la perdo de gebovoj en la paŝtpovaj regionoj. Mi mem kelkfoje ĉasis ilin, unufoje eĉ nescie naĝis inter ili en la larĝa Roper-rivero. Kompreneble, kiam oni avertis min, mi rapidege eliris el la **akvo!** Sed tio estas alia rakonto.

Krokodiloj kreskas ĝis longeco de 30 futoj (preskaŭ naŭ metroj), do kompreneble oni ne havas ilin kiel dombestojn en nia lando.

Ŝajne ili estas same kontentaj, naĝante aŭ en marakvo aŭ en freŝakvo, ĉar ofte oni povas vidi ilin de la ferdeko de ŝipo multajn kilometrojn for de la marbordo.

La „fish crocodiles” (fiŝ-maĝantaj) estas malpli grandaj. Ili kreskas nur ĝis longeco de 5 futoj ($1\frac{1}{2}$ metroj) kaj oni povas sendanĝere naĝi inter ili mi ja faris tion!

Precipe serpentoj abundas en Aŭstralio kaj preskaŭ ĉiuj estas venenaj. El tiuj speciale menciinda estas la „taipan”, kiu ne nur estas granda kaj rapida, sed ankaŭ venena kaj atakema. Ĝi atakas bestojn de ĉiaj grandecoj kaj povas engluti tutan kangarueton.

Ankaŭ granda estas la pitono: 20 futojn. Ĝi ĉirkaŭvolvas sian viktimon kaj mortpremas ĝin. Ankaŭ ĝi povas engluti plenkreskintan kangaruon (angle: „Wallaby”). Generale tiuj serpentegoj falas sur siajn viktimojn el arboj apud arbaraj vojetoj kaj nur malofte la kaptito liberiĝas.

Dum la milito, kiam mi deĵoris ĉe Darwin, la ĉefurbo de la ŝtato Norda Teritorio, mi trovis 3-metran pitonon sub mia lito. Pitonoj estas venenaj.

En la Norda Teritorio abundas ankaŭ multaj spĉoj de insektoj kaj araneoj. La plej granda Aŭstralia araneo estas nomita „Bird-Catcher” (Bird-kaptanto) kaj estas 22 centimetrojn granda. Ĝi kaptas birdojn kaj tiras ilin en sian truon en la tero. Kiam oni ĝenas ĝin, ĝi ekstaras sur la malantaŭaj piedoj kaj atakas. Eĉ la indiĝenoj timas ĝin.

Ne tiom granda estas la „Huntsman” (Ĉasisto), kiu mezuras 17 centimetrojn. Ĝi loĝas sub arboŝelo kaj flankenmarŝas kiel krabo. Ambaŭ araneoj estas tre venenaj. Foje la pikmordo estas mortiga.

Mi devas mencii ankaŭ la multajn diversajn formikotipojn. Ekzistas blankaj, bluaj, ruĝaj, verdaj, oranĝaj, flavaj, brunaj kaj nigraj ĉiuj koloroj de la spektro. Grandaj kaj malgrandaj, arbformikoj kaj terformikoj. Formikoj, kiuj saltas; formikoj, kiuj marŝas kaj formikoj, kiuj kuras. Speciale pri la verdaj formikoj, kiuj loĝas en arboj, mi havas neplaĉajn memorojn.

Iun tagon mi iris, nescie, al bambua bosko por tranĉi kelkajn bambustangojn por konstrui tendskeleton. Forte mi svingis la hakilon en la 15-centimetrojn dikan trunkon kaj amase falis el la skuita bambufoliaro la ĝenitaj verdaj diabletoj.

Poste la rigardantoj sur proksima monteto gratulis min pro mia gracia kaj energia „Danco”, dum kiu mi senvestigis min ĝis nudeco. Imagu, ke oni pikas vin per ruĝvarmega kudrilo. Nu, multobligu tiun senton cent-milfoje!!!

Tie troviĝas ankaŭ la tiel nomata „Bull-ant” (bovo-formiko), kiu estas 4 centrimetrojn longa. Kiam ili mordas per siaj grandaj pinĉmakzeloj, ili ne plu maltenas kaj oni devas fortiri la korpon, lasante la kapon kun la pinĉiloj en la haŭto. Do atentu la Bullant!

(Daŭrigota).

JUNULA TEATRO.

Ĉu iam, kiam vi estis juna, vi ludis teatraĵeton? Mi jes. Estas tiel plaĉe! Mi plenumis la rolon de maljuna virino, malmoderna, kiu ĉiam koleris pri siaj filinoj.

Verdire, miaj „filinoj” estis pli aĝaj ol mi! Tiu severa rolo fakte ne taŭgis laŭ mia karaktero. Mi ja estas tre trankvila kaj malfacile kolerigebla.

Sed kiel ĉarma mi estis, vestita per longa, nigra robo kaj kufeto laŭ la malnova modo! Kiel ridinde sonis mia alta voĉeto tra la teatro. Ho, se vi vidus kun kiom da seriozeco ni ĉiuj ludis! Estis belege!

Sed kio plej gravas, okazas post la teatraĵo. Ŝajnas al vi, kvazaŭ vi faris ion intereseĝan kaj fiere vi altigas vian kapeton Kaj kiam iu diras al vi ĝentile: „Ho, kiel ĉarma vi estis”, vi respondas kun mezfiere kaj ironia rideto: „Ĉu ne?”

G. Zarca, Marrakech, Maroko.

Ni, junuloj vivas por la estonteco.

(Responde al la artikolo „Serĉu la feliĉon en n-ro 148/149”¹⁾).

La aŭtoro de la artikolo diras en ĝi: „Forgesu la hieraŭan tagon, ne cerbumu pri la morgaŭo! Serĉu la feliĉon laŭ la ebloj, kiuj estas en vi mem!”

Pri tiuj vortoj mi ne povas konsenti!

Kiel estas eble vivi kaj esti feliĉa nur por la hodiaŭa tago kaj por si mem? Forgesi la pasintecon — tio povas esti ebla — tamen en tre malluma pasinteco de iu homo li povas trovi feliĉajn momentojn, pri kiuj li ĉiam rememoros.

Sed ne pensi pri la estonteco! Ni, junuloj, ja vivas por la sekvontaj tagoj. Ĉiuj niaj pensoj kaj revoj estas direktitaj al la estonteco, kiu certe estos pli bona kaj ĝoja kaj en kiu ni trovos pli da feliĉo.

¹⁾ Fakte ni atendis pli da komentarioj je tiu temo. Ĝi ja estis sufiĉe grava! Do — ankoraŭ verkaĵoj estas bonvenaj!
Red.

Atingi en la vivo tion, kion ni plej forte deziras — tio estas feliĉo. Tiel oni vidas, ke la feliĉo ne venas per si mem — ni devas labori por ĝi kaj ankaŭ batali.

Homo sola ne povas esti vere feliĉa, se aliaj ĉirkaŭ li estas malfeliĉaj. Tia feliĉo ne estas klara homara sento. Feliĉo ne estas afero de unuopulo, sed afero de la tuta homaro. Kaj la hodiaŭa plej granda malfeliĉo estas, ke ĉiuj homoj ne jam povas esti feliĉaj.

Tio estas nur kelkaj punktoj rilate tiun ĉi demandon. Pli amplekse kaj detale mi povas diskuti kun interesatoj perletere.

Drago K., Ljubljana-54, Jugoslavio.


I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned.
Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

Voĉo el Indonezio.

El letero de k-o A. C. v. Ingen, Sabang (P. Weh), Indonezio, ni ĉerpas:

La laboro por Esperanto estas tre malfacila ĉi tie. La malmultaj personoj, kiuj iom scipovas Esperanton, ne emas aŭ ne volas okupi sin pri nia idealo aŭ ne havas tempon por ĝi. Mi do devas komenci ĉe la komenco; la laboro estas tute pionira. Pro



tio mi petas la helpon de ĉiu esperantisto.

Ĉi tie Esperanto havas grandan estontecon, ĉar multaj personoj volas rilati internacie kaj tion ili klopodu laŭ la plej facila vojo: tio estas unu simpla lingvo, kiu sufiĉas por interrilati kun homoj en ĉiuj landoj.

Niaj kontraŭuloj diras: „Lernu la anglan lingvon, ĉar milionoj da personoj scipovas ĝin!!!”

Al ili ni demandu: „Ĉu vi bezonas milionojn da personoj por internacie interrilati? Certe ne. Vi bezonas nur kelkajn en ĉiu lingvo-teritorio aŭ en ĉiu ŝtato, nur kelkajn vere progresemajn homojn; tiaj estas la Esperantistoj.

„La junularo lernu la anglan lingvon!!!” Tio estas krimo de generacio al generacio kontraŭ la junularo. Por lerni la anglan lingvon ili devas energie studi dum multaj jaroj. La samon ili povas akiri, se la nuna generacio enkondukas Esperanton kiel la duan lingvon en ĉiuj lernejoj de la mondo.

La unua tasko de ni, esperantistoj, estas: varbi almenaŭ unu reprezentanton en ĉiu granda urbo de la mondo. Ne la multnombra anaro estu nia forto, sed densa reto de fervoraj delegitoj. Ne la granda amaso kun nur loka vivo estas grava, sed la malmulto kun internaciaj interesoj.

La esperantistoj en Eŭropo energie laboras por varbi unu, du kuiristinojn sen internaciaj interesoj kaj forgesas la milojn en ĉi tiuj regionoj, miloj, kiuj sopiras al interrilatoj kun Eŭropo, miloj, kiuj ne havas tempon, energion kaj forton por lerni multajn lingvojn.

Cu la eŭropaj esperantistoj ne komprenas sian mision ĉi tie?

Esperable miaj kolegoj en Eŭropo komprenos, ke estas plej grave stimuli

kaj helpi pioniran laboron ĉi tie. Pro tio mi kuraĝas voki ĉiujn gekolegojn:
„Helpu! helpu!!!!”

Vi povas helpi per la alsendo de ilustrita poŝtkarto, malnova, senvalora Esperanto-materialo kaj bildoj uzablaj por la instruado. Sed nepre ne sendu tekstojn en iu ajn eŭropa lingvo, ĉar la infanoj k.t.p. ne intencas studi tiujn malfacilajn lingvojn.

Grava informo: La Germana Instruista Unuiĝo decidis dum la kongreso de Germana Esperantista Asocio en Mainz, dum pentekosto, aliĝi al I.L.E.I. La reprezentanto estas s-ro Karl Kröber, prezidanto de la Unuiĝo.

Ebla ŝanĝo en nia programo de I.L.E.I.-kunvenoj en Paris: Pro eventuala parolado de k-o Lentaigne pri „Presarto en la lernejo” kaj „Internacia Lerneja Korespondado” verŝajne nia dua kunveno ne okazos vendredon, sed mardon, je la 14-a h. kaj 30 minutoj.

Vidu la anoncojn en la kongresejo.

Karaj Lernejanaj.

Nun jam baldaŭ vi havos ferion. Eble kelkaj el vi jam estos liberaj, kiam aperos ĉi tiu numero.

Certe multaj el vi iros eksteren, al la marbordo, al la arbaroj kaj erikejoj.

Ĉu vi legis la verkaĵon de Bohumil Slavik pri la drosero, en la antaŭa numero? Ankaŭ en Nederlando oni trovas tiun floron, ekzemple en malsekaj lokoj en erikejo. „Sunroso” nomas la nederlandanoj ĝin.

Nun mi proponas, ke vi en via ferio bone serĉu, ĉu vi trovos droserojn (estas diversaj specoj), kaj ankaŭ aliajn florojn. Se vi bone atentis, vi vidis multajn belaĵojn en la naturo!

Kompreneble vi en via ferio ne ŝatas fari verkaĵojn en Esperanto. Sed mi tamen konsilas al vi fari etajn notojn pri interesaj aĵoj kaj aferoj, kiujn vi renkontas. Tiam vi en septembro, kiam la lernejoj ree komenciĝis, povos fari interesan verkaĵon pri via ferio. Kiu sendos la plej interesan verkaĵon ricevos de mi premion. Se eble vi faru ankaŭ desegnaĵojn.

Sendu ĉion al TJO-Centro en West-Grafftdijk, Nederlando. Ne forgesu aldoni viajn nomojn kaj adreson, kaj ankaŭ vian aĝon.

Kaj nun al ĉiuj: agrablan ferion!

N. K.

Proverboj:

Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo.

Laŭdu tagon nur vespere.

Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme.

NIA VERKILO.

???



Ĉu en via lando estas multaj azenoj?


1.
Kia?



2.
Kiu?



3.
Kio?



4.
Kie?



5.
Kiel?



6.
Ĉu ĝi estas birdo?
Ĉu ankaŭ ĝi flugas?
Kiel?

Respondu al: Kiu?, kia?, k.t.p. per tuta frazo, sed skribu ankoraŭ kelkajn aliajn frazojn pri la 6 bildoj.


Kaj nun: al ĉiuj miaj junaj geamikoj mi deziras ĝojigan libertempon, kiu donu al vi novan energion kaj kuraĝon.

Post la libertempo ni daŭrigos nian laboron.

Skribu al mi, sur bildkarto, kie vi estis en via libertempo!

P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned.

La venonta n-ro de „La Juna Vivo” aperos meze de septembro.



Tiam la longa kaktio iom volis turmenteti la ciklamon. Ĝi diris: „Ĉe la najbaroj mi vidas blankan ciklamon. Ĝi havas pintajn foliojn kiel la hiacinto kaj la trunko estas same dika. Ĉiuj ciklamoj havas graciajn trunketojn, ĉu ne??”

„Ne,” rapide diris la hiacinto, „tio ne estas ciklamo! Tio estas mia kuzino, la blanka narciso. Ĝi certe staras tie en ujo kun ŝtonetoj kaj akvo.”

„Ĉu vi havas multajn parencojn?” demandis la dika kaktio. „Ni havas pli ol 100 specojn.”

„Ho jes, tre multajn”, diris la hiacinto. „La blanka kaj la flava narcisoj estas miaj kuzinoj, ankaŭ la tulipoj kaj la krokusoj.”

Neniu tre kredis tion kaj ĉiuj subridis.

La hiacinto fariĝis tre ĉagrena pro tiu ridado. Malgaje ĝi klinis sian pinton.

Tion vidis la luno.

„Kio estas al vi, hiacinto?”

La kompatinda bulbo rakontis pri sia ĉagreno. Tiam la luno sendis malvarman radion super la kaktiojn kaj la ciklamon. Tiuj iom hontis.

Al la hiacinto flustris la luno:

„Mi helpos vin!”

Tiam la hiacinto ree havis kuraĝon kaj rektigis sian pinton.

El la lerneja gazeto de Edamo, Ned. (Daŭrigota).

Junularo, laboru por via propra gazeto: „LA JUNA VIVO”.

La vivo de Zamenhof ¹⁾.

Ludoviko Zamenhof naskiĝis en la urbo Bjalistok en Warsaw je la 15-a de decembro en la jaro 1859-a. Li estis infano de malriĉa familio. En Bjalistok estis Rusoj, Poloj, Judoj, Litovoj, Blankrutenoj kaj Jataroj kaj ili ĉiuj parolis sian nacian lingvon kaj ili ne komprenis la najbarajn lingvojn. Zamenhof havis la ideon, ke li elpensos internacian lingvon por la tuta mondo. Li havis tiam 14 jarojn kaj li pensis, ke estos malfacile fari la lingvon.

En la jaro 1879-a li finis la elpenson de la lingvo kun la nomo Esperanto. En Warsaw la personoj nomis lin „La Doktoro Esperanto”.

Tiam li komencis la studadon de medicino en Moskvo.

En 1889 aperis la unua gazeto „La Esperantisto” kaj en 1905 okazis la unua Internacia Kongreso en Boulogne.

Ludoviko Zamenhof mortis je la 14-a de aprilo, 1917. Li enteriĝis ĉe la Varsovia Hebrea Tombejo kaj tie li ripozas en paco.

Esperantistoj en la tuta mondo tenas lian memoron.

Kanto kun movoj.

(Oni povas aldoni multajn strofojn. La melodio estas laŭ la ario „Here we go round the mulberry bush”).

Ni tiel kuradas en rondo nun.

Jes, jes, jes. Jes, jes, jes.

Ni tiel kuradas en rondo nun,

En vintra kaj frosta mateno.

Ni tiel kombadas la harojn nun.

Jes, jes, jes. Jes, jes, jes.

Ni tiel kombadas la harojn nun,

En vintra kaj frosta mateno.

Ni tiel lavadas la manojn nun.

Jes, jes, jes. Jes, jes, jes.

Ni tiel lavadas la manojn nun,

En vintra kaj frosta mateno.

Ni tiel kuradas lernejon nun.

Jes, jes, jes. Jes, jes, jes.

Ni tiel kuradas lernejon nun,

En vintra kaj frosta mateno.

Ni tiel lavadas vizaĝojn nun,

Jes, jes, jes. Jes, jes, jes.

Ni tiel lavadas vizaĝojn nun,

En vintra kaj frosta mateno.

Ni tiel forkuras por ludi nun.

Jes, jes, jes. Jes, jes, jes.

Ni tiel forkuras por ludi nun,

Jes, jes, jes. Jes, jes, jes.

Neĵo Rimanto (Kopirajto rezervita).

¹⁾ Ci tio estas la premiita verkajo de Valerie Savin, lernantino en la Rutherford High School en Newcastle-on-Tyne en Anglujo. Si studis Esperanton dum du jaroj. Ni kopiis la verkajon tiel, kiel ni ricevis ĝin.

La makuloj de la kokcinelo.

(Mallonga fe-rakonto de Jean Dawson, kiam ŝi estis 14-jara, post dujara studado de Esperanto, en la moderna lernejo en Whitburn, Anglujo).

Iam estis arbaro en granda lando. En ĉi tiu arbaro ludis nokte multaj gefeoj. Ili estis tre feliĉaj escepte de unu malgranda feo. Li treege volus danci kun la aliaj, sed bedaŭrinde li estis malgracia kaj pro tio malfeliĉa. Neniu multe ŝatis lin, ĉar ili kredis, ke li volas esti ĉiam tute sola. Sed ili malpravis.

Ili ofte dancis en la mezo de rondo de agarikoj, dum li malgaje foriris por legi siajn lerneajn librojn kaj fari aritmetikon.

Unu belan lunan nokton li foriris por esti sola, ĉar la aliaj intencis ĝui gajan dancfeston. Oni ornamis la arbojn per brilaj rubandoj. Ĉiuj gefeoj aĉetis aŭ kudris novajn vestojn el florpetaloj. Ĉiuj estis feliĉaj. Kial? Ĉar la fea reĝino intencis viziti la lokon por partopreni la dancadon.

Kiam la malĝoja feo, kies nomo estas Persomonio, aŭdis pri la afero, li petis:

„Permesu al mi resti por vidi la Fe-reĝinon. Tio estas mia sola deziro.”

Moke ili respondis:

„Ho vi, malgraciulo vidi la Reĝinon Ne ridigu nin! Ĉerte ne!”

Do li malfeliĉa foriris denove por fari sian aritmetikon. Li sidis sur alta muro kaj tenis en unu mano plumon kaj en la alia libron. Li pensis: „Mi ne povas solvi ĉi tiun aritmetikaĵon. Ĝi estas tro malfacila.”

Lace li faligis la plumon ĝuste en la sama momento, kiam kokcinelo preterpasis. Malbonŝance, kelkaj inkeroj falis sur la insekton kaj faris makulojn.

„Ho, ekpluvas!” ĝi ekkriis, „Mi devas rapidi al mia hejmo!”

Ĝis hodiaŭ la makuloj restis sur la kokcinelo, sed ne diru tion al ĝi, ĉar eble ĝi koleriĝos.

Ruzulo.

Vi estas egoisto, Peĉjo! De via pomo vi eĉ ne peceton donis al via fratino!

Mi petas pardonon, panjo. Mi donis al ŝi la grajnoj! Se ŝi semas ilin en bona grundo, ŝi poste havos tutan pomarbon!

Salomon Myara (lernanto de publika E-to-kurso en Liceo Mangin en Marrakech, Maroko).

Amataj bestoj en Japanujo.

(El letero de Hideo Sugita en Japanujo al s-ino Gregory en Britujo).

Mi volas skribi ion pri niaj bestoj. Nia nova katino jam tre grandiĝas, sed ankoraŭ estas katido. Ni nomas ĝin „Ĝojeto”.

Ĝia patrino estas la fratino de nia mortinta „Bel”.

Ĝojeto similas al Bel laŭ kvieteco, sed ĝi havas tri kolorojn: blanka, nigra kaj ruĝflava. Nun ĝi dormas sur miaj genuoj, rondforme.

Ni havas kvar gekokojn. Kiam pluvas ni metas la kokinejon en nian domon.

Hodiaŭ estas pluva tago, tiel ankaŭ ili estas apud mi kaj ili ankaŭ kviete dormas, ĉar nun jam estas vespero, ĉirkaŭ la deka posttagmeze.

Hideo Sugita, Marusima-Iyo I, Miyazaki-si, Japanujo.

La kato rabisto.

Unutage la kato vidis neston de birdo en arbo. Li duone atingis la neston, kiam la birdo venis hejmen. Ĝi klopodis sin kaŝi en la arbo, sed la birdo ĝin vidis. Ĝi bekpikis la katon. Kaj la kato sentas sin fali malsupren. Bang! Ĝi estas sur la tero.

Verkis laŭ la Freinet-metodo Garry Parker.
(El la lerneja gazeto „The Williw-boys own”,
Willoughby, N.S.W., Aŭstralio).

POSTMARKRUBRIKO.

Pro la transloĝiĝo de la sekretariino la ricevitaj poŝtmarkoj devis atendi kelkajn semajnojn. De nun ni denove tuj respondos post la ricevo de viaj poŝtmarkoj.

Multaj amikoj sendis kvantojn al ni. Koran dankon al ĉiuj! Ni jam respondis ilin.

1: A. Aiken 70 el Kanado kaj 140 el Anglujo.

2/3: A. Bizet 17 kaj s-ro Pialla 175 el Francujo.

4/5: A. Navarro 300 kaj José Savra 50 el Hispanujo.

6: C. Zarka 345 el Maroko.

7/8: F. H. Kat 150 kaj S. S. de Jong 100 el Nederlando.

9: Ho jes, amiko v. Marrum, ni volonte atendos viajn pm.

Kelkaj amikoj ne skribis al ni kion ni sendu al ili. Ĉu viaj sendaĵoj estas donacoj?

Libro-Servo, M. Tinxgracht 10, Edamo, Nederlando.

ENIGMOJ.

Mi ricevis dek sep provojn el Anglujo kaj unu el Nederlando.
Kelkaj perdis poentojn, ĉar ili ne faris sian propran liston en la dua enigmo.

Jen la solvoj:	JuVelo	G
	UnIverso	EG
	NeVo	LEG
	ArOganta	FLEG

Novaj enigmoj.

I. Faru vian propran krucvort-enigmon. Desegnu kvadraton el 25 ĉeloj. Metu super la ĉelojn de la supra flanko la literojn A, B, C, D, E.

Flanken de la maldekstra latero metu, de supre malsupren, la ciferojn 1, 2, 3, 4, 5.

(r) signifas, ke oni skribu nur la radikon de la indikita vorto.

Horizontale:

1. A-E: Osteto en la buŝo.
2. A-E: Avida pri mono.
3. A-D: Mallonge skribi.
4. A-E: Krii kiel kokino.
5. A-B: Nedifina pronomo.
6. C-E: Ĝoja bruo (r).

Vertikale:

- A. 1-5: Respondi post donaco.
- B. 1-5: Natura ŝanĝo (r).
- C. 1-5: Senarta, senafekta (r).
- D. 1-5: Plekti fadenojn.
- E. 2-5: Havanta akran guston (r).

II. Trovu la bestojn kaŝitajn en la sekvantaj frazoj (la unua montras al vi la ideon):

1. Si parolis per ak**RA T**ono.
2. Vi ronkas, do dormu sola.
3. La suno estas granda globo.
4. Arlekeno povas salti groteske.
5. Johano malpurigis per oleo novan veston.
6. Laŭte muziku ni, klopodante surdigi vin.
7. En vintra nokto mi okaze nombris miajn librojn kaj trovis multajn perditajn.
8. Nur sovaĝulo portus karbon en blanka tolo.

Sendu viajn solvojn antaŭ la 5-a de **septembro** al s-ro T. K. Slade, 7 Southview Rd., Southampton, Anglujo.

SKOLTA RUBRIKO.



Francujo: En „Servir” (= servado), monata gazeto de la sendependa franca federacio de neŭtralaj geskoltoj, aperis la sekvanta atentigo:

„En nian hejmon alvenis delegito de la Skolta Esperantista Ligo kaj li akceptis la funkcion de ĝenerala instruanto de Esperanto en nia asocio. Baldaŭ nia Pariza grupo enhavos esperantistan roton. Ĝi estos la unua esperantista roto en Francujo kaj certe estos ankaŭ la sola agema esperantista roto en la mondo.

Krome nia distrikto en la orienta parto de Parizo akceptos Esperanton inter siaj agadoj. Dank' al niaj klopodoj la internacia lingvo, fonto de paco, disvastiĝos inter la junularo!”

Skoltoj el Latvio: En la mondo troviĝas kvin mil skoltoj el Latvio. Multaj el ili estas en Germanujo kaj Usono.

Zigzaganta Hipopotamo.

Agado en Berlino: En Berlino tri grupoj de skoltoj lernas Esperanton. Ili kunvenas unufoje en ĉiu semajno por la instruado. La instruistoj estas malnovaj esperantistoj, kiuj venis el la junularmovado de antaŭ 1933. La instruado estas senpaga, dank' al la juna koro de la instruistoj.

La skoltaj esperantistaj grupoj kaj la aliaj junularaj esperantistaj grupoj laboras kune pri Esperanto-aferoj kaj estos helpservo okaze de solenaĵoj aŭ festoj, radiodissendoj aŭ ĝenerala propagando por Esperanto. Krom tio la skoltoj aranĝis helpservon por maljunuloj laŭ la situacio en Berlino. Ili kolektas lignon en la arbaro, hakas ĝin, transportas karbon kaj faras aliajn servojn.

Willie Schiemann, Berlin-Spandau.

TJO-RUBRIKO.

(Sekretariino A. Kaagman, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando).

Kelkaj ĉefperantoj informis pri novaj adresoj, bonvolu bone noti tion:

Aŭstralio: Frank Halls nun loĝas: 59 Nepean Highway, Elsternwick S 4, Melbourne Vic.

Belĝujo: Post la 22-a de julio la adreso de Ph. Cullus estos: 13 rue Chopin, Anderlecht-Bruselo.

Ĉeĥoslovakujo: Mašek nun ree loĝas je sia malnova adreso: Tr. pres. Kl. Gottwalda 17, Karlovy

Vary I. (poŝtĉekkonto Ĉ-2. 331.

Hungarujo: S-ro P. Balkanyi petis nin forstreki lian nomon de la listo de ĉefperantoj, ĉar li ne ŝatas akcepti kotizojn, kiujn li ne povas transigi al ni. Ni treege bedaŭras lian decidon, ĉar ni scias, ke li estas fidela amiko de „LJV”. Esperu ni ke la situacio en la „mono-mondo” baldaŭ pliboniĝos!

Dume ni de ĉi tie dankas s-ron Balkanyi pro ĉio, kion li faris ĝis nun, kaj ni fidas ke ankaŭ estonte li helpos laŭeble.

Proponoj por la laborkunveno en Konstanz:

Envenis nur unu propono, de la belga ĉefperanto. Jen lia letero:

„Mi havas la plezuron direkti al vi jenan proponon por la laborkunsido en Konstanz:

„La sesa Internacia Junular-Kunveno de Tutmonda Junular-Organizo okazonta en Konstanz (Germanujo) kun partopreno de 400 personoj el 20 landoj subskribas la alvokon faritan de la Monda Komitato de la Paco-Partizanoj por la absoluta malpermeso de la atoma armilo, armilo de terurigo kaj de ekstermado de la loĝantaroj.

„Ni postulas starigon de streĉa internacia kontrolo por certigi la aplikadon de tiu malpermeso.

„Ni konsideras ke la registaro, kiu kiel la unua uzus kontraŭ kiu ajn lando la atoman armilon, farus krimon kontraŭ la homaro kaj estus traktota kiel militkrimularo.

„Ni alvokas ĉiujn bonvolajn homojn en la mondo por ke ili subskribu tiun alvokon.”

Mi petas ke oni represu la tutan tekston aŭ nenion, sed ke ĉiamaniere mia peto troviĝu en la tagordo de la kunsido. Dum nacia kunveno de la Belga Sekcio mi proponos la samon kaj mia propono fariĝos eventuale propono de la Belga Sekcio. En Konstanz mi deziras mem defendi mian proponon.

Ph. Cullus.



6-a Internacia Junular-Kunveno en Konstanz, Germanujo (28/7—4/8 1950)

Adr. de la loka Organiza Komitato: Michel Schmidt, (17b)
Konstanz a. B., Grüngang 9

Ĝis julio '50 anoncis sin 450 personoj el 20 landoj. Se efektive ĉiuj sukcesos akiri pasporton kaj vizon la kunveno do fariĝos la plej granda I.J.K. el la ĝisnunaj!

La poŝta adreso estos: „Internacia Junular-Kunveno, Konstanz, Germanujo”. Oni ne sendu poŝtaĵojn post la 1-a de aŭgusto, ĉar oni ne povos resendi malfruiĝintajn leterojn.

Necesas kunporti bankostumojn. Kaj nepre ne forgesu kantarojn kaj — se eble — muzikilojn!

Ĝis revido en Konstanz!!!

Tria donacisto: Kore dankante al ĉiuj donacintoj ni kvitanças la ricevon de jenaj donacoj: J. E. (Lyon): 6,00 DM; O. E. (Lyon): 6,00 DM; G. M.

(Lyon): 6,00; M. P. (Tarare): 1,20; G. M. (Cwmgrwach): 5,80; Ph. J. (Glynneath): 5,80; A. R. (Norköping): 4,00; J. M. (Bagnolet): 7,80; R. B. (Vileurbanne): 2,40; A. S. (Niedorp): 3,30; d. V. (den Helder): 2,00; d. V. (den Helder): 2,00; N. K. (West-Grafdijk): 2,50; A. K. (Purmerend): 2,00; P. P. (Namur): 16,80; G. L. (Desvres): 2,40; B. R. (Nancy): 6,00; J. R. (Ipswich): 1,50; G. E. E. (Toulouse): 6,00; A. B. (Geleen): 2,00; P. N. (Skjern): 2,00; M. G. (Heigenbr.): 1,00; J. F. (Chelles): 1,20; M. F. (Chelles): 1,20; N. (Birmingham): 5; G. E. Illkirch: 3,60; J. P. H. (Illkirch): 1,20; A. H. (Aschaf-fenb.): 1,00; 7 instruistinoj en Charente: entute 4,20.

K O R E S P O N D A D R E S O J

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Aŭstrujo: La Esperanto-lernantinoj de la ĉeflernejo en Salzburg, Griesgasse 2, dez. kor. kun samaĝuloj (12-13-j.) en la tuta mondo.

Bulgarujo: Georgi Ganev, 22-j. oficisto en Kooperativo, dez. kor. pri ĉiuj temoj. Vil. Djadovo, Novo Zagorsko.

Marin Koev, ĉumerna 6, Kazanlik, dez. interŝanĝi poŝtmarkojn, novajn nur en kompletaj serioj. Respondo certa.

Ĉeĥoslovakujo: 18-j. studento dez. kor. per il. poŝtk. Ne k. Polujo k. Germ. Prefere k. Ameriko k. okcidenta Eŭropo. Jar. Kubat, Ostrava 1, Nadrazni 9.

Jaroslav Bernatik, Dol. Suchá I, ĉ. 242, Silezio, ŝatus kor. kaj interŝ. diversajojn kun gesamideanoj en la tuta mondo.

La Esperantista Junularo en Praha aranĝos la 14-an de septembro letervesperon. Skribu multnombre. Esp. klubo en Praha, Praha I, Box 281.

Finnlando: S-ro Jussi Sive, instruisto, Sara, resp. al komencantoj, korektas erarojn kaj resendas la leterojn kontraŭ rekompenco de 50-150 sendifektaĵ uzitaj pm. aŭ 3-8 int. resp. kup. Afranku filatele.

Hispanujo: La gelernantoj de „Esperanto-Fako” de kooperativo de Manteksistoj, str. Teruel 26, Barcelona G, dez. kor. kun la tuta mondo.

Ricardo de Luna (dentteknikisto) dez. kor. kun samprofesiaĵoj k. interŝ. pm., kun seriozuloj. Str. Paseo Colón 5,1º = 2ª, Barcelona.

Conrado Companys Sicart korespondos kun tutmondaj kamaradoj. Str. Rogent 79, 4º, Barcelona (SM).

Afbla peto: Kiu ne jam pagis sian kotizon al sia landa ĉefesperanto (vidu kelkajn adresŝanĝigojn je paĝo 505) bonvolu tuj fari tion. Post la 15-a de julio nederlandanoj prefere ne plu pagu ĝire, ĉar ni sendos al ili kvitancojn.

Pro la kurzo-ŝanĝigoj ni devis ŝanĝi la kotizojn en kelkaj landoj. Ĉisube ni publikigos ilin. La legantoj en la koncernaj landoj bone atentu ilin.

Aŭstrujo: 14 ŝ. (lerneja eldono 6 ŝ.); **Brazilo:** 19 kruc. (i.e. 8 kruc.); **Ĉeĥoslovakujo:** 225 Kĉs. (145); **Finnlando:** 185 fmk. (110 fmk); **Hispanujo:** 30 pes. (12 pes.); **Hungarujo:** 15 frt. (6 frt.); **Polujo:** 1000 zl. (400 zl.).

VERDLANDO VOKAS.

Listo de radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ la nederlanda (= mezeŭropa) horsistemo. Flandroj kaj aliaj Greenwich-temp-anoj bonvolu depreni unu horon.

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso.

Ĉiutage	15.45—16.00	Prago, 25,51 m: I.
	19.45—20.00	Sofio, 39,11 m: I. kaj P.
	22.00—22.15	Prago, 31,41 m: P.
Dimanĉe	9.00, 11.00, 13.00:	„Nigra Stacio”, 47.13 m: Gram.
	17.00—17.20	Romo, 19 m, 25 m: I. kaj muziko.
Lunde	6.30—6.35	Vieno, 513 m, 25 m, 31 m, 41 m, 48 m: I.
	17.30—18.00	Rio de Janeiro, 375 m, 30,71 m: K.
	22.45—23.00	Prago, 470 m, 315 m: I. kaj P.
Marde	12.55—13.00	Berno, 48,66 m, 31,46 m: P. de d-ro A. Baur.
	18.40—18.45	Berno, 48,66 m, 31,46 m: Ripeto de la tagmeza elsendo.
Merkrede	0.45—1.00	Gvatemalo 49 m: I.
	18.00—18.20	Lille, 235 m: P. (Nur ĉiuduamerkrede: 5 kaj 19 VII k.t.p.)
	20.15—20.30	Varŝavo III, 48,23 m: I.
	22.45—23.00	Prago, 470 m, 315 m: I. kaj P.
	23.00—23.45	Prago, 470 m, 315 m: „La Verda Stacio” dissendas sian tre aŭskultindan artoprogramon!! (Nur la unuan merkredon de ĉiu monato).
Ĵaŭde	12.55—13.00	Berno, 48,66 m, 31,46 m: P. de d-ro Edmond Privat pri mondfederacio kaj mondpaĉo.
	15.30—15.45	Graz (Alpland), 240 m: K. de prof. Hainschegg. (Nur la unuan ĵaŭdon ĉiumonate).
	18.40—18.45	Berno, 48,66 m, 31,46 m. Ripeto de la tagmeza elsendo.
Vendrede	9.05—9.20	Parizo, 347 m: K. (Nur ĉiuduavendrede).
	16.40—16.55	Vieno 203 m, 48 m, 25 m, 31 m, 41 m: I. (Nur ĉiuduavendrede!)
	17.00—17.20	Romo, 19 m, 25 m: I. kaj muziko.
	17.45—18.00	Hilversumo II, N.C.R.V., 298 m: P. (Nur unufoje en du monatoj). 25-VIII-1950: P. de H. A. de Hoog pri: „La Evangelio per Esperanto.”

Bona novaĵo!! — „Katholieke Radiogids” sciigis en sia numero de 21-V-'50, ke K.R.O. (Katolika Radio-Unuiĝo) denove planas elsendi en Esperanto. La Esperanto-elsendoj okazos **ĉiusemptate** tuj post al nederlandlingvaj novaĵoj de la 23.00-a horo, do proksimume je la 23.15. Siatempe ni enlistigos tiujn elsendojn.

—

Agrablan aŭskultadon deziras al vi ĉiuj S. S. de Jong Dzn., Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TJERKWERD (Frislando), Nederlando, al kiu oni sendu ĉiujn informojn pri radio-elsendoj.